# Postmilita E-junularo en Třebíč

*Pavel Sittauer*

La 8-an de majo 1945 finigis aliancanoj en Eŭropo la 2-an mondmiliton. Jam kelkajn tagojn poste en nia urbo denove vigliĝis geskoltoj. Multaj de ili volis kontaktiĝi kun geskoltoj alilandaj. Sed kiel? Dum milito tute ne estis ebleco lerni ian fremdan lingvon. Oni povus, sed nur germanan. Kaj germanoj tiam estis niaj malamikoj!



La plej facila vojo kontaktiĝi do estis Esperanto. Jam en la jaro 1947 kelkaj geskoltoj aliĝis al la 2-a postmilita esperanta kurso, kiun tiam gvidis prof. Kilian. Ankoraŭ dum la kurso tri gekursanoj, nome Olga Hrubešová, Jaris Habeš kaj mi fondis Skoltan Esperanto-Ligon. Kaj tuj la SEL enhavis ĉirkaŭ 30 membrojn. Mi kiel la plej juna fariĝis estro de SEL. Sed, sed, sed!


Venis nova komunista registaro, kiu en la jaro 1950 likvidis skoltismon, kiu laŭ ili devenis de okcidentaj imperiistoj. Nia SEL tuj aliĝis al loka Esperanto-Klubo kaj fariĝis E-Junularo. Tuj al la junularo aliĝis multaj geskoltoj kaj nia E-klubo havis pli ol 200 membrojn!

La grandan grupon ni dividis al malgrandaj trupoj kaj dum programo unufoje semajne oni devis dediĉi 1 horon al instruado de E. Nia programo estis interesa kaj plaĉis al la kultura inspektoro. Pro tio li en la jaro 1952 permesis al ni organizi la 1-an SET-on. Ĝi okazis en la golfo de Vranov-akvobaraĵo Chvalatice. La inspektoro estis, dank' al Dio, esperantisto. Lia kondiĉo estis ĉiutage instrui almenaŭ du horojn Esperanton kaj al ĉiu demando de instruistoj respondi. Jes, ni estas tendaro, sed lingva tendaro!



Kaj kio okazis? Baldaŭ ĉiuj EK en nia lando eksciis pri nia E-tendaro. Kaj multaj interesuloj volas partopreni. Aliĝis tiom da homoj, ke al ni mankis la tendoj. Do kion fari? Ni devis finfine en la jaro 1955 organizi 3 etapojn. Kaj kio pli poste okazis?

Laŭ rezulto de ideologia komisiono de distrikta komunista partio la tutŝtata tendaro ne estis permesita. La funkciuloj de organizantoj estis punitaj. Mi estas la ĉefa organizanto. Sed mi dank' al Dio soldatservos. J. Habeš, mia anstataŭanto, devis por unu jaro labori en uranminejoj en Příbram. Estron de junularo ni elektis s-anon Zdeněk Brož, ĉar li jam estas nur laboristo. Kaj kio okazis?



De laboristo oni lin faris minejisto. En la jaro 1956 la tendaro bedaŭrinde ne okazis. Sed printempe en la 1957-a jaro revenis s. Habeš el mineja brigado! Estis iom malfrue. Sed tamen li tuj komencis la tendaron organizi. Bedaŭrinde nur kun 17 partoprenantoj. Mi forlasis la armeon en oktobro 1957. Ankoraŭ vintre mi kontrolis nian tendaron. Sed bedaŭrinde sur la herbejo de nia loko jam staras du kabanoj. La vintro tiam estis frostega, la akvobaraĵo estis frostiĝinta! Ni do transiris ĝin kaj trovis novan lokon en la golfejo de Lančov.

En Lančov ni do unuafoje tendaris en 1958. Tiam ĝin kun mi organizis s-ano Herman. Li estis ne nur esperantisto, sed ankaŭ komunisto. Dank' al li ni ricevis pli poste monsumon por aĉeti kabanojn. La kabanojn ni mem konstruis. Antaŭ sesdekjariĝo de la tendaro pruntedonis al ni monon estintaj partoprenintoj por konstruado de necesejoj kaj lavejo.



Nun do la tendaro estas vera lernejo de lingvoj. Ni devas diri de lingvoj. Kial? Ĉar en lastaj jaroj aliĝas al E nur malmulte da interesiĝantoj, ni do devis instrui ankaŭ ceterajn lingvojn. En la jaro 2012 ni rememoris la sesdekjariĝon de niaj tendaroj. Dum daŭro de niaj SET-oj vizitis ĝin centoj, eble miloj da partoprenintoj. Sed kie ili estas?

Kiun tendaron de ĉiuj sesdek jaroj mi plej multe ŝatis? Tiun 1-an tutŝtatan en la jaro 1955. La ŝtataj organoj punis nin. Jes, vere! Pri tio mi jam skribis! Sed en tiu ĉi jaro mi trovis tiom da geamikoj! Multaj bedaŭrinde foriris jam labori al sankta Petro. Ekzemple Jarda Maršík, Vuk Echtner, Drahoš Kočvara, Karel Kraft, Dieter Berndt, Karel Franc.

Multaj laboris aŭ ĝis nun laboras en E-movado. Ekzemple Věra Podhradská.



*Fotoj el la SET-kroniko*